

AMAS MI

Esperantigo : Rovere Emanuele

Muziko / vortoj : Adamo Salvatore

Amas mi la venton, kiu tiklas vin, kiam ĝi ludas tra via hararo,
kiam vi fariĝas dancistino, por ĝin sekvi kun movoj graciaj.
Amas mi, kiam vi ĝojplene rapidas, por vin ĵeti en miajn brakojn,
kiam vi mienas kvazaŭ infano por sidi sur miaj genuoj.
Amas mi la sunon sterniĝantan sur vian haŭton karessoifan,
kiam, matene, ĝi vekas nin, imagas mi, ke nur por ni ĝi brilas.
Amas mi vian manon, kiu min sekurigas, se mi perdiĝas tra timoj
kaj duboj kaj via voĉo dolce flustras : fidon ĝi redonas kaj esperon.
Amas mi l'okulojn sincerajn viajn, kiam ili min surŝutas
per amaj rigardoj kaj poste, en perfekta harmonio,
mia frunto serenripozas sur via kor'.